

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito
Albert Schweizer, 8-a parto. Frédéric Passy, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 596, 1975.03.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la jubileo Albert Schweizer ni prezentas al vi historieton de la Nobel-pacpremiitaro. Vi aŭdas la okan prelegon de tiu serio.

A.- Dum la pasintaj prelegoj ni prezentis la personecon, laboron kaj penson de Frédéric Passy, la ricevinto de la unua Nobel-pacpremio en 1901.

Cl.- Hodiaŭ, per anekdotoj, ni montros, kiel tiu kuraĝa ekonomiisto, kiu fariĝis la sekretario de la pacorganizaĵoj **Societo por la Internacia Arbitrado** kaj de **Unuiĝo de Parlamentanoj**, povis influadi la politikajn eventojn favore al paco kaj arbitrado.

A.- Inter 1881 kaj 1888 li estis membro de la Franca Parlamento. Li profitis por grupigi ĉirkaŭ si la aliajn deputitojn, kiuj estis favoraj al la internacia arbitrado, kaj li faris proponon favore al subskribo de arbitra traktado inter Francio kaj Usono. La afero maturiĝis, nur kiam li ne plu sidadis en la Parlamento. Liaj britaj kaj usonaj pac-amikoj lin regule informadis pri la disvolviĝo de lia tiama propono. Kiam Frédéric Passy sciis, ke fine ĉio estis en ordo flanke de Vaŝingtono, tiam li iris al la franca Ĉefministro Goblet, por lin atentigi, ke nun la franca registaro povas fari la unuan paŝon antaŭen. « *Ne estas tio, kion oni skribis al mi el Vaŝingtono* » respondis la Ministro. « *Do vi ne estas ekzakte informita* » respondis Frédéric Passy, kaj li tiris el la paŝo la protokolon *Official Record* de la ĵus okazinta kunveno de la Usona Senato : « *Jen la teksto de la proponoj per kiuj la prezidanto de Usono estas invitita eknegoci kun vi.* » - « *Mi neniam estis informita pri tiuj dokumentoj* » vigle respondis la ministro eksurprizita. - « *Tamen ili certe troviĝas en viaj arkivoj, sed tre verŝajne oni juĝis, ke tiu afero ne meritas esti komunikita al vi.* » Frédéric Passy ne aldonis, ke estis oficistoj de la Franca Ambasadejo en Vaŝingtono, kiuj rekte sendis la koncernan kopion al li, kiam ili konstatis, ke la Ambasadoro kontraŭstaris la ideon mem de arbitrado.

Cl.- En 1886 milito komenciĝis inter Turkio kaj Grekio. Kiel kutime Frédéric Passy provis interveni favore al la paco. Li sciis, ke la ses grandaj Potencoj de Eŭropo havis la devon arbitri tiun konflikton, sed ke tiun rolon ili ne ludis. La 19-an de aprilo Frédéric Passy iris al la Franca Ministerio por Eksteraj Aferoj por averti, ke li faros demandon pri la turko-greka konflikto en la Parlamento. « *Ho, ne faru tiun demandon, ĝi povos esti ĝena por la Ministro, kaj la afero estas jam sufiĉe komplika.* » - « *Mia demando estos farita.* » - « *Do, revenu morgaŭ por unue renkontiĝi kun la Ministro.* » La morgaŭon Frédéric Passy kunsidis kun la Ministro sinjoro de Freycinet. Kaj poste li faris sian demandon en la Parlamento. Responde la Ministro memorigis la progresojn de la ideoj pri internacia arbitrado. Li diris, ke tiurilate li scias, ke li povas kalkuli je unuanima apogo de la Ĉambro. Li devis agnoski, ke en kazo de konflikto inter Turkio kaj ties najbaroj : Rumanio, Serbio, Bulgario aŭ Grekio, arbitrado jam estis antaŭvidita fare de de internaciaj traktatoj. Tiu arbitro estis la kuniĝo de la ses grandaj potencoj de Eŭropo. Li ankoraŭ diris, ke kiel reprezentanto de la Franca Registaro li ĵus intervenis favore al la arbitrado de tiu konflikto. Frédéric Passy akceptis la respondon, kaj la tagon mem la konflikto estis ĉesigita favore al internacia arbitrado.

A.- Kelkajn jarojn poste okaze de la enterigo de la duko de Aumale, Frédéric Passy renkontiĝis kun sinjoro de Freycinet, kiu ne plu estis Ministro. Tiam la milito estis ĵus

rekomenciĝinta inter Turkio kaj Grekio. « *Ĉu vi memoras pri la milito, kiun ni siatempe malhelpis per nia orkestrita interveno ?* » demandis Frédéric Passy – « *Jes, ĉiutage mi memoras pri ĝi. Kaj mi estas konvinkita, ke se oni estus nin imitinta, ankoraŭ ĉifoje oni estus povinta ĉesigi tiun ĉi militon profite al arbitrado de la konflikto.* »

Cl.- Frédéric Passy ofte ripetis, ke eta gesto ofte sufiĉas, por ke konflikto, anstataŭ disvolviĝi per armiloj, disvolviĝu per arbitrado.

A.- Jen tria anekdoto. Frédéric Passy partoprenas en Torino packongreson. Estas la jaro 1898. Pere de profesoro Corsi li estas informita pri la arbitra traktato ĵus subskribita inter Italio kaj Argentino. Tiuj du landoj decidis submeti sen iu ajn limigo ĉiujn eblajn estontajn kontestojn al arbitrado, kaj ili tre zorge antaŭdecidis pri la interven-reguloj. Sed en la sama momento la kunsidantoj de la packongreso estis informitaj pri komplikaĵoj inter la respublikoj de Argentino kaj Ĉilio. Milito inter tiuj du landoj ĵus komenciĝis pro limaj problemoj. Tuj la kongreso sendis al Buenos-Ayres kaj Santiago depeŝojn sufiĉe eksplicitajn kaj insistajn, kiuj petis la prokraston de la milit-agadoj favore al arbitrado. Intervenis la reĝo de Britio, kaj lia arbitrado kontribuis al konkludo de definitiva paco inter la du sudamerikaj respublikoj. En la montaro Andoj, honore al tiu mirakla arbitrado estis pompe starigita giganta statuo reprezentanta la Princon de la Paco.

Cl.- La vivo de Frédéric Passy estas sinsekvo de tiaj intervenoj. Se necese, li rekte skribis al la ŝtatestroj. En tiuj leteroj, kiujn li skribis kiel sekretario de **Societo por la Internacia Arbitrado**, li ĉiam memorigis la traktatojn aŭ paktajn klaŭzojn, kiuj estis malobservataj. Kaj ofte li sukcesis haltigi armitajn konfliktojn, dum ankoraŭ estis tempo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!